



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 170

Junio 2000

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@esperanto.nu

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



PRI MANIFESTO 2000

Antaŭ du monatoj mi ricevis, kun aktuala numero de la revuo *Esperanto*, faldfolion pri „Manifesto 2000: Paco en niaj manoj.” Temas pri kvinpunkta plano rilata al la fakto ke UNO deklaris la jaron 2000 „Internacia jaro por la kulturo de paco.”

Oni anoncas ke la subskribojn oni prezentos al la Ĝenerala Asembleo en septembro 2000.

Unuavide, kiu povus dubi pri la valoro de tia petskribo – kiu postulas de tiu, kiu subskribas ĝin, ke tiu (1) respektu ĉiun vivon, (2) rifuzu perforton, (3) dividi kun aliaj, (4) aŭskultu por kompreni, (5) konservu la planedon

kaj (6) remalkovru solidarecon? La subskribanto, notindas, “devontigas sin en sia ĉiutaga vivo, familio, laboro ktp” sekvi la principojn supre listigitajn. Tuj do estas evidente, ke ĉi tiu manifesto tre malsimilas al la nun bone konata „praga manifesto”.

Dum la praga manifesto strebas atentigi homojn pri Esperanto kaj ĝia utileco, kaj postulas de eventualaj subskribantoj nur ke ili ĝenerale subtenu

E s p e r a n t o n ,
M a n i f e s t o 2 0 0 0 e s t a s
m u l t e p l i a m b i c i a .
Kaj tie troviĝas la problemo.

Manifesto 2000 estas multe pli ambicia. Kaj tie troviĝas la problemo.

daŭrigota ➡

daŭras ➡

Antaŭ kelkaj monatoj mi notis en kanada tagĵurnalo artikolon pri la rimarkinda malsukceso de manifesto en urbo en la kanada provinco Ontario. Tie virina grupo verkis manifeston, pri kiu ili petis virojn ĝin subskribi. Per subskribo viro promesis neniam plu trakti virinojn perforte. Post kelkaj semajnoj, tamen, oni akiris nur kelkajn dekojn da subskriboj en granda urbo. Kion konkludi? Ĉu la viroj de tiu urbo estas tiom seksismaj aŭ perfortemaj? Tute ne. Kiel iu rimarkis en la artikolo, la problemo estis ke al viroj iom malplaĉis ke oni supozis ke ili devis subskribi ion tian, kvazaŭ ili ĉiuj estas ja tiom perfortemaj. Kaj tial malmultaj subskribis. Oni ne rajtas konkludi tamen ke preskaŭ ĉiuj viroj en tiu urbo favoras perfortan traktadon de virinoj pro ilia nesubskribo.

Ni revenu al Manifesto 2000. Mi proponas ke neniu deca homo kontraŭus ĝiajn postulojn. Ili estas laŭdindaj celoj. Tial, kion montros amasa subskribo? Estas iom kvazaŭ

oni demandus, „Kiu deziras justecon, pacon ktp?” Plue, eĉ se oni ne vere intencas plenumi la postulojn de la Manifesto 2000, oni kompreneble facile povas ĝin subskribi - tia estas petskribo. Neniu poste riproĉos lin/ŝin pro agoj kontraŭ la postuloj de la manifesto. Konklude, manifesto nepre ne estas efika maniero ŝanĝi la agadmanieron de homoj. Oni ja kuraĝigu homojn sekvi la principojn skizitajn en Manifesto 2000; sed oni ne malŝparu la tempon de movadanoj kaj aliaj per kolekto de subskriboj. La praga manifesto, mi substreku, havas utilan rolon, atentigante eksterulojn pri Esperanto kaj per demandoj al ili subskribi kaj per (ni esperu) fina impona sumo da kolektitaj subskriboj por prezento al la monda publiko. La fina listo de subskribantoj de Manifesto 2000 signifos nenion: ĝi estos nur listo de bonvolemluloj kaj hipokritoj. Nur la agoj de homoj plenumos la celojn de UN kaj UNESKO.

— Geoffrey Greatrex

VIZITO AL KANADO

Antaŭ 20 jaroj mi laboris dum unu jaro en Toronto ĉe diversaj familioj kiel patrinhelpantino. Tiun someron mi havis ŝancon vojaĝi tra la tuta lando okcidenten ĝis la insulo de Vankuvero, poste norden ĝis Jukono, kaj finfine revenante hejmen mi vojaĝis al Kebekio. Tiu ĉi grandega vojaĝo estis tre agrabla kaj riĉiga por mi. Survoje mi ĉiam renkontis afablajn homojn, kaj landanojn kaj gestudentojn el Eŭropo.

daŭrigota ➡

daŭras ➡

Pasintan aŭtunon, post 20 jaroj mi revenis al Kanado por vizito, sed ĉi-foje mi spertis alian Kanadon.

Unue mi vizitis „mian malnovan familion” ĉe kiu mi laboris dum sep monatoj, kaj miris pri la varmega akcepto de ili kaj ankaŭ de iliaj amikoj post tiom da jaroj. Mi informis ilin pri mia vojaĝ-maniero pere de Esperanto. Komprenoble la plimulto de ili neniam antaŭe aŭdis pri Esperanto, sed ili tuj entuziasmiĝis pri ĉi tiu movado.

Dum la aliaj semajnoj mi gastis ĉe esperantistoj, kaj komprenoble ankaŭ ili bonvenigis min. Mi unue gastis en Montrealo, poste en Nov-Brunsviko kaj finfine en Nov-Skotio. Mi vere estis feliĉa dum unu monato en orienta Kanado kaj ĉiutage mi ĝuis mian restadon tie. Krom la afablegaj homoj, ĉiutage la vetero estis belega, do ĉio estis mirige bela. Mi ne bezonis zorgi pri io ajn; la homoj ĉiam venis al mi por informi min, do ĉio iris glate. Ankaŭ la eŭrop-simila pejzaĝo (ofte ŝanĝ-anima kaj sovaĝa) tre plaĉis al mi, kontraŭe al la enuiga pejzaĝo de la kanadaj prerioj.

Kiam mi revenis al Toronto mi tuj devis raporti al miaj amikoj pri mia restado en Nov-Skotio, ĉar ankaŭ ili ŝatas la naturecon kaj afablecon de la nov-skotianoj kiuj estas tute malsamaj al la materialistaj torontanoj.

De tiuj ĉi ferioj mi neniam forgesos nokton kiun mi pasigis en iama malliberejo kune kun du francaj studentinoj. Tio okazis en la ĉefurbo de Kanado, fakte en la Otava junular-gastejo, kiu troviĝas eĉ en bela burĝa domo. Sed tiu domo antaŭe estis malliberejo! Do, nun mi scias kiel aspektas la interno de malliberejo.

Pro la bonega memoraĵo de tiuj ĉi ferioj, mi decidis denove ferii en Nov-Skotio venontjare en aŭtuno por povi travivi la keltan festivalon sur la insulo de Kabo Bretona.

Mi dubas ĉu vi, kanadaj esperantistoj, spertos tiajn kortuŝajn feriojn en Eŭropo ĉar bedaŭrinde la plimulto de eŭropanoj estas fermitaj al la fremduloj.

Do, ĝis poste en via lando aŭ eble iam antaŭe en Eŭropo!

— Dominique Marcon
(el Reutlingen Germanio)

NdIR: Dominique estas ital- kaj franc-devena francino kiu laboras dum jaroj kiel tradukisto de teknika informo el la germana en la francan, italan, anglan ktp por germana fabriko.

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★